

IV. CONGRESSO

DEGLI

Donaco de:
Giancarlo SARTORIO

Esperantisti Italiani

MILANO

dal 31 Agosto al 2 Settembre 1913

organizzato dal

CIRCOLO ESPERANTISTA MILANESE

BIBLIOTECA PAGCEI

SARTORIO

ESPERANTO



Kvara kongreso de la Italaj Esperantistoj

organizita de la

Milana Rondo Esperantista

Bonvenon en Milano, gesamideanoj!

Pro specialaj kaŭzoj ni ne povas saluti vin sur nia tero kiel anojn de la internacia Esperanta kongreso. Nun ni estas feliĉaj, ke tamen vi venis, por multe pli modesta festo, al nia nacia kongreso, la kvara en Italujo.

Estu nia kongreseto forta manifestacio je la favoro de Esperanto, kaj vidu nun la skeptikuloj en nia urbo kaj en la tuta itala regno, kiom fortajn radikojn havas nia Afero en la tuta civilizita mondo.

Kiel en ĉiuj landoj, nova movado, kia nia Esperanta, devas trairi la neeviteblajn tri ŝtupojn: skeptika neatento, supereca moko kaj fine respekto. Ni volas nun en Italujo forlasi la duan ŝtupon kaj atingi la trian. Helpu nin, gesamideanoj, en tiu ĉi klopodo!

Sed ne nur helpon ni petas de vi, gesamideanoj el el fremdaj landoj; ni esperas, ke vi sentos vin dum nia kongreso en Esperantisma atmosfero. Kunligu nin do ĉiam dum niaj diskutoj kaj babiladoj la sento de vera samideaneco, la konscio pri la grandiozeco de niaj komunaj celadoj. Por ni Esperanto signifas kulturo, kaj kvankam ĉiu ajn estas plene libera, uzi nian lingvon por ĉiaj celoj, estas kompreneble, ke al la ideo de neŭtrala interpopola lingvo sin ligas multaj parencaj ideoj, pri kiuj ni ŝatas interbabili.

Bonvenon do denove en Italujo kaj en Milano!

La Organiza Komitato.

Samideani Italiani!

Il saluto della pagina precedente si dirige tanto a voi, quanto ai nostri amici dell'estero, ma non sarà superfluo aggiungere qualche parola che ci diremo fra noi poichè riguarda esclusivamente il movimento nazionale.

Per vincere i grandi ostacoli che oppone al nostro movimento civilizzatore lo scetticismo pubblico, scetticismo che non ha nulla a che fare con quella prudenza necessaria che non vuole compromettersi con imprese immature, anzi ridicole, ma scetticismo piuttosto originato dalla completa ignoranza su quanto succede intorno a noi, scetticismo poi assecondato da un'indolenza troppo seduttrice quando si tratta di nuovi orizzonti della cultura umana; per ottenere che il pubblico italiano ci conceda il rispetto dovuto al nostro movimento e vi prenda parte, è assolutamente necessario di creare una forte organizzazione nazionale, capace di conferire ai suoi rappresentanti di fronte al pubblico ed alle autorità governative il diritto di parlare nel nome dell'Italia Esperantista intiera, capace pure di proporre alle amministrazioni delle scuole degli insegnanti competenti tanto della loro professione quanto della nostra lingua neutrale quando si tratterà, come lo ambiamo, di introdurre l'Esperanto nelle pubbliche scuole.

Mettendo dunque a parte ogni questione personale o vecchio risentimento, ci raduniamo per studiare la possibilità di unificare, nel senso suaccennato, la propaganda, l'insegnamento e la Stampa Esperantista in Italia. Non v'è dubbio che, guidati esclusivamente dall'entusiasmo per la nostra causa e dal buon senso, troveremo i mezzi per dare all'Esperanto sul territorio dalla lingua i-

taliana uno sviluppo grandioso, corrispondente all'accoglienza che l'Esperanto ha trovato all'estero.

Al lavoro dunque, e che nessuno ritenga insignificante la sua opera! L'Unione fa la Forza!

Siate tutti i benvenuti!

Il Comitato Ordinatore.

COMITATO D' ONORE

Nob. Avv. Emanuele Greppi, SINDACO DI MILANO.

Avv. Carlo Panizzardi, Senatore del Regno, PREFETTO DELLA PROVINCIA DI MILANO.

Ing. Grand'Uff. Angelo Salmoiraghi, Presidente della CAMERA DI COMMERCIO DI MILANO.

Prof. Giovanni Bognetti, Presidente del CIRCOLO FILOLOGICO MILANESE.

COMITATO ORDINATORE

Dott. Angelo Filippetti, Consigliere Provinciale, PRESIDENTE.

Luciano Cattorini, Via Paolo Sarpi 60, Milano, VICE-PRESIDENTE.

Oscar Bünemann, Via Aurelio Saffi 24, SEGRETARIO e CASSIERE.

Prof. Ferdinando Cavalca,

Dott. Petro Schacht,

Rag. Luigi Solenghi,

Samuele Taliero,

Lino Terzoli,

Rag. Enrico Violi.

Norme generali.

Informazioni sul congresso: Presso i signori: Luciano Cattorini, Via Paolo Sarpi 60; Rag. Enrico Violi, Via Al. Talino 26a, e Oscar Bünemann, Via Saffi, 24,

Lingue: Le relazioni saranno in Eperanto; la discussione sarà pure in Esperanto, soltanto in via eccezionale la lingua italiana sarà ammessa. Durante la inaugurazione del congresso, per riguardo alle autorità cittadine ed il pubblico non esperantista, prevarrà l'italiano.

Alloggi: Rivolgersi per tempo al Sig. Luciano Cattorini, Via Sarpi 60, Milano. Come albergo si raccomanda l'Albergo Moderno in Via Carlo Alberto, sull'angolo della Piazza del Duomo. Vedi l'annuncio.

La Stampa: è ammessa liberamente al congresso.

Sede: La sede del Circolo Esperantista Milanese è situata in Via Aurelio Saffi 24 presso Sig. Bünemann. La sede permanente del congresso si trova nel Pulvinare dell'Anfiteatro dell'Arena, dove pure si tengono le adunanze e le sedute di lavoro.

Ristorante: Si raccomanda la pensione « La Centralissima » in Via Cappellari N. 7, dove si può mangiare alla carta o con menù fissi. Vedi l'annuncio. Gli esperantisti italiani sono pregati di fare da interpreti pei samideani esteri che non sanno intendersi col cameriere.

Generalaj informoj.

Informojn pri la kongreso donas la s-roj: Luciano Cattorini, Via Paolo Sarpi 60, Rag. Enrico Violi, Via A. Tadino 26a kaj Oscar Bünemann, Via Aurelio Saffi 24, Milano.

Lingvoj: La paroladoj okazos en Esperanto, same kiel la diskutoj; nur escepte la uzo de l'itala lingvo estos

permesata. Dum la solena malferma kongreso regos parte la itala lingvo pro konsideroj de gentileco kontraŭ la ĉeestantaj urbaj aŭtoritatuloj kaj la ne-esperantista publiko.

Logado: Turnu vin ĝustatempe al s-ro Luciano Cattorini, Via Paolo Sarpi 60, Milano. Kiel hotelon ni rekomendas « Albergo Moderno Meublé » (Hotelo Moderna Meblita) en la Strato Karlo Alberto, je la angulo de la Placo de l'Katedralo. Vidu la anoncon.

Restoracioj: Estas rekomendinda la restoracio « La Centralissima » (La Centrega) en Strato Cappellari, tute proksime je la Hotelo Moderna kaj la Placo de l'Katedralo. Tie oni povas manĝi laŭ fiksitaj menuoj kaj laŭ la karto, malkare. Al vegetaranoj ni rekomendas la vegetaran restoracion en Via Silvio Pellico 6, tute proksime je la Galerio Vittorio Emanuele.

Kongresejo: La kunsidoj okazos en la salonego da la « ARENO » (en la Nova Parko, proksime je la Kastelo). En apuda ĉambro troviĝos la ekspozicio. Tiu ĉi konugresejo estos ankaŭ ĝenerala informejo pri la kongresaj aranĝoj.

AKCEPTEJO:

La kongresanoj alvenantaj per la vagonaroj matenaj de la dimanĉo, 31a de aŭgusto, estos akceptataj de samideanoj en la stacidomo, kie la kongreso dum tiu tempo havos specialan ĉambreton.

Kongresanoj, kiuj alvenos per aliaj vagonaroj, bonvolu iri al la hotelo kaj preni siajn dokumentojn en nia kongresejo, la Areno.

Tramveturiloj de la stacidomo al la placo de la Katedralo: linioj 1 kaj 2. Por la direkto al la Katedralo estas preferinda linio 2, por la direkto al la Stacio estas preferinda linio 1. La Hotelo Moderna (« Albergo Moderno Meublé ») havas omnibuson ĉe la stacidomo.

Regularo por la Kongreso

I° La KVARA KONGRESO DE LA ITALAJ ESPE-
RANTISTOJ, organizata de la MILANA RONDO ESPE-
RANTISTA okazos en Milano de la 31a de aŭgusto ĝis
la 2a de septembro 1913. Estos aranĝata samtempe ek-
spozicio Esperanta.

II° Anoj de la kongreso estos ĉiuj personoj pagintaj
ĝis la 31a de aŭgusto 1913 al la Organiza Komitato
la kotizaĵon de L. it. 5.— (Sm. 2.—).

III° Al la aliĝintoj pagintaj la kotizaĵon kaj al la me-
broj de la M.R.E. estos donata rekonkarto, kiu en Ita-
lujo donos rajton por la fervojaj rabatoj. Plie ili ricevos
la programon de la kongreso anhavantan la liston de la
diskutotaj temoj.

IV° La kongreso estos prezidata de la Provinca Kon-
silanto D-ro Angelo Filippetti. La Vicprezidonto kaj la
Sekretario estos elektataj de la kongresanoj dum la ĝe-
nerala labora kunsido.

V° La prezidanto kaj — se mankas li — la vicprezid-
anto prezidos la kunsidojn kaj direktos la diskutojn; la
sekretario redaktos la protokolojn.

VI° La anoj de la kongreso rajtas partpreni la diskut-
ojn kaj — escepte je la ne-italoj ne loĝantaj en la i-
tala regno aŭ en italligvaj teritorioj-la voĉdonojn. La per-
sonoj akompanantaj la kongresanojn povos ĉeesti la kun-
sidojn kaj la paroladojn.

VII° La diskutantoj rajtos paroli dum dek minutoj
kaj ne pli ol trifoje pri unu temo. La paroladistoj ne
havos tian templimon kaj rajtos respondi al ĉiuj personoj
partprenintaj la diskutadon. Pri la proponoj de temoj di-
skutotaj aŭ io alia ne prezentita ĝis la 30a de aŭgusto tag-
meze al la Organiza Komitato, la kunsido decidis rilate


je ilia akceptigo aŭ malakceptigo, por la pritrakto kaj diskuto.

VIII° La parolantoj kaj diskutantoj povos post la kuneso tuj transdoni al la sekretario resumigon de siaj diroj. Sa tio ne okazis, la protokolo resumigon de iliaj diroj. Se tio ne okazis, la protokolo redaktita de la sekretario estos nekontestebla.

IX° Ne povos eniri en la diskutojn demandoj lingvaj, politikaj aŭ religiaj.

X° La dokumentaro pri la kongreso estos publikigata de la Organiza Komitato kaj sendata al la partprenintoj de la kongreso.

XI° La Organiza Komitato rezervas al si la rajton, ŝanĝi la ordon de la laboroj kaj decidi pri tio, kion ne prikonsideras tiu ĉi regularo.



Regolamento del Congresso

I° Il IV. Congresso degli Esperantisti Italiani, organizzato dal Circolo Esperantista Milanese, si terrà a Milano dal 31 agosto fino al 2 Settembre 1913. Ad esso è annessa un'esposizione esperantista.

II° Saranno membri del Congresso coloro che avranno rimesso al Comitato Ordinatore, entro il 31 agosto 1913, la quota di L. 5.—. Pei membri del Circolo Esperantista Milanese, il versamento della quota è facoltativo.

III° Agli aderenti che hanno versato la quota ed ai membri del C. E. M. verrà rilasciata una tessera che dà diritto ai ribassi ferroviari. Essi riceveranno inoltre il programma del Congresso contenente l'elenco degli argomenti da discutersi.

IV° Il congresso sarà presieduto dal Consigliere Provinciale e Comunale Dott. Angelo Filippetti. Il Vice-Presidente ed il Segretario verranno eletti dall'Assemblea durante la prima seduta.

V° Il Presidente, ed in difetto il Vice-Presidente, presiederà le sedute e dirigerà le discussioni; il Segretario redigerà i verbali.

VI° I membri del Congresso hanno diritto di partecipare alle discussioni e, ad eccezione dei forestieri che non hanno domicilio nel Regno d'Italia e nelle regioni italiane dell'Austria-Ungheria e della Svizzera, alle votazioni. Le persone accompagnanti i congressisti potranno assistere alle sedute ed alle conferenze.

VII° Gli oratori godranno del diritto di parlare per 10 minuti e per non più di tre volte su ogni tema. I relatori non avranno tale limite di tempo e potranno rispondere ai singoli oratori che hanno preso la parola. Per le proposte di temi od altro non presentate entro il 30 agosto a mezzogiorno al Comitato Ordinatore, l'assemblea deciderà di ammetterle o meno per lo svolgimento e la discussione.

VIII° Gli oratori che avranno preso la parola potranno in fine di seduta consegnare al Segretario un riassunto delle loro osservazioni. In difetto di ciò il verbale redatto dal Segretario sarà incontestabile.

IX° Saranno escluse dalla discussione questioni linguistiche, di politica e di religione.

X° Gli atti del Congresso verranno pubblicati dal Comitato Ordinatore e spediti ai membri del Congresso.

XI° Il Comitato Ordinatore avrà facoltà di modificare l'ordine dei lavori e deliberare sopra quanto non è previsto dal presente regolamento.

BIBLIOTECA
SARTORIO GENOVA
ESPERANTO

PROGRAMO

Dimanĉon, la 31an de aŭgusto 1913:

- 15a horo: La kongresanoj estos solene akceptataj de la urb-estraro en la salonego de la « ARENO ».
- 16.30: Solena malfermo de la kongreso kun festa parolado de Prof. D.ro Arturo Ghez el Trieste.
(Post tiu kunesto la kongresanoj vespermanĝos.)
- 20.15: Kanta koncerto: vira horo kantos karakterizajn italajn himnojn kaj la « Esperon ». (Poste oni promenos en la parko senĝene kaj iom post iom enlitigos.)

London, la 1an de septembro 1913:

- 8.00 — 12.—: Laboraj kunsidoj, traktontaj precipe pri organizaĵo en Italujo.
- 8.30 — 12.—: Por ne-kunsidantoj: Vizito al la urbo Milano kun ĝiaj vidindaĵoj.
- 14.30: Komuna ekskurseto al la urbo Monza (Reĝa Parko); renkontigo precize je la 14.30 ĉe Porta Venezia.
- 19.45: Komuna festeneto sekvota de senĝena babilado, komuna kantado, deklamaĵoj kaj monologoj. La komuna manĝo okazos en Via Cappellari 7 (Restoracio « Centralissima »); prezo po persono L. 3,50 inkluzive je vino aŭ minerala akvo.

Mardon, la 2an de septembro 1913:

- 8a horo: Renkontigo ĉe la Norda Stacidomo (Stazione Ferrovie Nord). Vidu specialan programon.

Ciuj kunsidoj okazos en la salonego de la « Areno », romata Pulvinare.

PROGRAMMA

Domenica, 31 agosto 1913 :

Ore 15.— : Solenne ricevimento dei congressisti dal Municipio nel Pulvinare dell'Arena, locale gentilmente concessoci dal Comune per tutte le nostre sedute.

Conferenza inaugurale del Prof. Dr. Arturo Ghez.

Ore 20.15 : (Nel Pulvinare dell'Arena) Concerto di canto.

Lunedì, 1 settembre 1913 :

8.— — 12.— : Sedute di lavoro. Vedi a parte il programma. Contemporaneamente i congressisti che non partecipano alle sedute di lavoro, visiteranno in carovana la città di Milano.

14.30 : Gita a Monza (Regio Parco). Incontro alle 14.30 precise in piazza Porta Venezia.

19.45 : Banchetto sociale in Via Cappellari 7 (« La Centralissima ») seguito da recitazioni, monologhi ecc. Prezzo L. 3.50 la persona, vino od acqua minerale compresa.

Martedì, 2 settembre 1913 :

Ore 8.— : Gita al Lago Maggiore. Incontro alla Stazione Ferrovie Nord. Tram N. 12, 13 e 15 dal Duomo, 14, 16 e 31 dalla Piazza Cordusio. Ritorno a Milano Nord ore 21,46. Vedi programma speciale.



Programo de la Kunsidoj

Dimanĉon, la 31 aŭgusto, ricevos oficiale la urbestro la kongresanojn en la kongresejo (salono de l'ARENNO) je la 15a horo precize. Tuj poste okazos en la sama ejo la solena malfermo laŭ jena skizo :

- 1) Malferma alparolo de la prezidanto D-ro Filippetti.
- 2) Salutoj al la urbestroj kaj la gastoj.
- 3) Salutoj de la alvenintoj kaj reprezentantoj de italaj grupoj kaj urboj.
- 4) Salutoj de la gastoj el fremdaj landoj al la kongresanoj.
- 5) Festparolado de Prof. D-ro Arturo Ghez el Trieste.
- 6) Parolado de Prof. Scarselli : « L'insegnamento dell'Esperanto nelle Pubbliche scuole e Pratiche per l'Introduzione ».
- 7) Parolado de Cav. Avv. Attilio Vaona el Verona : « L'Esperanto ed il Movimento dei Forestieri ».

Je la 20,45 la kongresanoj revenos al la kongresejo, por aŭskulti italan ĥoron, kiu kantas karakterizajn italaĵn himnojn kaj nian Esperanto-Himnon. Poste oni promenos sengene en la parko.

Lundon, la lan de septembro, okazos la laboraj kunsidoj laŭ sekvonta programo. Samtempe la nepartprenantoj de la kunsidoj rigardos la vidindaĵojn de Milano laŭ speciala programo. La laboraj kunsidoj komenciĝos precize je la 8a horo en la kongresejo :

- 1) La Prezidanto de l'Organiza Komitato kaj la Prezidanto de la MILANA RONDO ESPERANTISTA alparolas la ĉeestantojn.

2) Elektoj por Vicprezidanto kaj Sekretario de l'kunsido.

Temoj priparolotaj :

- 3) La Esperanta Propaganda Organizado kaj la Esperanta Gazetaro en Italujo kaj itallingvaj regionoj. (Cav. Avv. Vaona).
- 4) La Neceseco unuigi la metodojn kaj la programojn de l'Esperanta instruado en Italujo (Otello Nanni).
- 5) Esperanto kaj la Blinduloj (Ing. Tancredi, blindulo).
- 6) Esperantistaj Kooperativoj (D-ro Stromboli).
- 7) Esperanto kaj la Studentoj (Prof. Monti).
- 8) Diversaj proponoj.
- 9) Adiaŭa saluto de la Prezidanto.
- 10) Komuna kanto de l'himno.

Mardon, 2an de septembro, neniŭ kunsido. Ekskurso al Stresa laŭ aparta programo. Ankaŭ pri la ekskurseto al Monza (1/9) vidu specialan programon.

Ĥkonduko tra la urbo Milano

Renkontiĝo precize matene je la 8,30 sur la Placo de la Katedralo (Piazza del Duomo).

Vizito al la Katedralo (itale Duomo). La konstruado de tiu ĉi grandioza kristana preĝejo en gotika stilo estis komencata en la jaro 1386a laŭ iniciato de la Duko de Milano Gian Galeazzo Visconti (parolu ĝan galeac-co viskonti). La tuta katedralo estas el blanka marmoro veninta al la regiono de l'Lago Granda (Lago Maggiore). La turo estas 108 metrojn alta, la lungeco de la Katedralo estas 148 metroj, proksimume 2000 marmoraj statuoj ornamas la eksterajon.

Je la suda angulo de la Placo de l'Katedralo troviĝas la Reĝa Palacaro kun reĝa preĝejo dediĉita al S-to Gotardo. Apud la reĝa palaco estas la palaco del l'Ĉefepiskopo de Milano.

La nordan flankon de la Placo ornamas la eniro en la Galerion Vittorio Emanuele, kiu kondukas sur la placon de la « Skala », unu el la plej vastaj teatroj de l'mondo. Sur la placo de la Scala troviĝas la monumento de Leonardo da Vinci; al kiu la mondo dankas la plej perfektajn pentraĵojn (plej konataj inter ili: La Gioconda. Lucrezia Crivelli, La Sankta Vespermanĝo), kaj al kiu Milano dankas mirindajn kanalojn trairantajn kaj fruktigantajn la tutan Lombardian ebenaĵon.

Proksime je la Scala troviĝas la artgalerio Muzeo Pol-di-Pezzoli, iom pli malproksime la arta pentraĵgalerio « Brera » fama en la tuta mondo. Al ĝi kondukas la strato Giuseppe Verdi dekstre de la « Scala ». Nia karavano pro manko de tempo ne vizitas tiujn muzeojn.

Ni iras tra Via Santa Margherita al Piazza Mercanti; ĝi estas karakteriza itala placo de l'mezepoko. Sur la flanko de la strato Mercanti staras la « Palazzo della Ragione » (iama Palaco de l'Justeco). Je la alia flanko ni vidas la belan « Loggia degli Osii ». Ni trairas la placon ĝis Via Orefici kaj turniĝas dekstren al la Piazza Cordusio kun la Borso kaj modernaj komercaj konstruaĵoj. Monumento de l'poeto Parini ornamas la placon. Tute proksime, en Via Bocchetto, troviĝas la palaco de la ĉefa Poŝtoŝefo kaj tiu de la Banca d'Italia.

Daŭrigante nian vojon, ni trairas la largan kaj belan Via Dante, kiu kondukas nin rekte al la monumento de Garibaldi. Pluenirante, ni atingas la KASTELON. Ĝi estas la rekonstruita kastelo fondita en 7368 de la Milana duko Galeazzo II Visconti, pligrandigita poste

de la dukoj Sforza, pro kiuj ĝi havas la nomon « Castello Sforzesco ». La 70 metrojn alta turo estas rekonstruita laŭ la modelo de la renesanca artisto Filarete kaj pro tio portas la popolan nomon Filarete. La du dikaj flankaj turoj servas nun kiel akvorezervejoj.

Transirante la grandan korton, ni alvenas ĉe la malantaŭa parto de l'Kastelo kaj vidas dekstre la « Dukan Korton » kaj maldekstre la « Rocchetta » parolu roket-ta).

La interno de la Kastelo (eniro Duka Korto) estas tre vidinda. Nia kongresa karto donas liberan eniron. Tre citinda estas la « Sala delle Asse », salonego pentrita de Leonardo da Vinci tiamaniere, ke ĝi ŝajnas kovrita de foliaro. La cetera enhavo konsistas el arĥeologiaj, etnografiaj kaj pentraĵaj kolektoj.

Ni daŭrigas la trairon de l'kastelo kaj alvenas en la « Nova Parko », grandioza publika ĝardeno, en kiu troviĝas la « ARENO », nia kongresejo. La areno estas konstruigita de Napoleono I. Venante el la kastelo, ni vidas je la kontraŭa finiĝo de la Parko la belan Arkon de l'Pace, nomatan ankaŭ Arko de l'Simplono.



Por fremduloj, kiuj disponas pli da tempo, ni citas ankoraŭ la sekvantajn vidindaĵojn:

Tombejo (itale « cimitero »). Oni veturas tien per tramlinio N. 6 de la Katedrala Placo. Ĝi havas luksegajn artaj monumentojn.

Publikaj Ĝardenoj: Bela parko kun malgranda zoologia kolekto kaj naturscienca muzeo, al kiu nia kongreskarto donas liberan eniron.

Pentraĵo « La Sankta Vespermango » de Leonardo da Vinci (parolu vinĉi) apud la bela preĝejo « Santa Maria

delle Grazie ». Eniro labortage L. 1—. Atingebla per tramlinio 16.

Kolonoj de Sankta Lorenzo: Laùiru la tutan straton Via Torino ĝis Corso Porta Ticinese. La Kolonoj estas restaĵoj el la tempo de la romanoj, kiuj nomis nian urbon Mædiolanum.



Milano

Sul nome di questa Metropoli Lombarda, la leggenda ha intessuto parecchie favole, diremo così, etimologiche; s'è parlato d'un capitano *Medo* e d'un altro *Olavo*, che avrebbero disegnato la città; d'un porco mezzo *no*, che avrebbero disegnato la città; d'un porco mezzo *medio lana*. Ma l'opinione più accreditata si fonda su questa conclusione: ogni nazione gallica aveva un centro politico e religioso chiamato *mezzo*, e *Mediolanum* colla fusione del *Medio* latino, e del gallico *lan*, indicante la terra per autonomasia, significò il centro insubre, il *Mediolanum Insubrum*, come c'era il *Mediolanum Ebarovicum*, il *Mediolanum Sequanorum*, — e via dicendo.

La città è a 45° 27'35" di latitudine Nord, e 26° 51'16" di longitudine Est.

La sua maggiore elevazione sul livello del mare è calcolata di m. 125. Giace sulle rive dell' Olona e del Seveso; il comune chiuso ha un circuito di 25.000 metri circa. La popolazione, è calcolata a circa 600.000 abitanti. E' incerta la fondazione di questa città, prima della venuta dei Galli in Italia; però, se non il primo fondatore, fu certo restauratore di Milano il gallo Bello-

veso intorno al 587 avanti Cristo, e fu allora la *Metropoli degli Insubri*.

Quando i Romani impadronironsi della Galla Cisalpina (195 av. C.) lo splendore di Milano venne oscurato da Modena e da Mantova, ma nel secolo II dell'era cristiana essa tornò ad avere il primato. Nel secolo III l'imperatore Massiminiano la fece sede dell'impero. Distrutto da Carlo Magno il dominio longobardo (774) Milano risalì al primo grado nell'Italia Settentrionale. Sotto gli imperatori della Casa di Franconia si liberò dai suoi signori laici ed ecclesiastici, e si costituì in repubblica quasi indipendente (1056) restando soggetta più di nome che di fatto al regno d'Italia che gl'imperatori germanici possedevano.

Sotto la Casa di Svevia fu il centro della residenza che gli italiani opposero a Federico I Barbarossa ed a Federico II. In quel corso di tempo soggiogò parecchie città lombarde, tra le quali Lodi (1111) e Cuneo (1118). Federico I scese a punirla e la distrusse interamente. Ma 15 anni dopo risorgeva dalle sue rovine e mettevasi a capo della *Lega Lombarda* (1167) finita colla vittoria di Legnano (26 maggio 1176), e colla pace di Costanza (1183). Nel 1257 Milano venne sotto la signoria della famiglia della Torre, a cui succedono i Visconti (1277) Francesco Sforza — Lodovico il Moro. La città fu molto travagliata nelle guerre combattute in Italia principalmente nel possesso della Lombardia, nei secoli XV e XVI, tra l'imperatore Carlo V e Francesco I di Francia, e benchè i francesi la occupassero (1499) rimase in possesso di Carlo V.

Nel 1576 fu devastata dalla famosa peste, detta di S. Carlo — 17.000 morti.

Morto Carlo II di Spagna, dopo la guerra di successione, il ducato di Milano passa agli austriaci, per la pace del 1748.

Bonaparte entra in Milano il 14 maggio 1796, e proclama la Repubblica Cisalpina. Rientrano gli austriaci il 26 aprile 1799 e governano 13 mesi, Bonaparte, dopo Marengo, rientra in Milano il 2 Giugno 1800; la città diviene capitale della Repubblica Italiana, poi del regno d'Italia. Incoronazione di Napoleone in Duomo, il 16 Maggio 1805. Il 28 Aprile 1814 rientrano gli austriaci col maresciallo Bellegarde, vicerè l'arciduca Raineri. Nel 1848 avvengono le memorabili *cinque giornate*, — 18 - 22 Marzo, colla cacciata degli austriaci; governo provvisorio, e voto della fusione immediata col Piemonte. Il 5 agosto gli austriaci rientrano in Milano. Il 6 Febbraio 1853 vi è un tentativo mazziniano, soffocato nel sangue. Finalmente nella guerra del 1859 lo straniero è definitivamente cacciato e l'8 Giugno vi è l'entrata trionfale in città di Vittorio Emanuele II e Napoleone III.

La città è restituita alla propria indipendenza ed all'Italia.



Programo de l'tutlaga ekskurso, 2. 9. 1913

(Programma della gita al Lago Maggiore)

Renkontiĝo precize je la 8a matene ĉe la NORDA STACIDOMO, kien kondukas la tramveturiloj 12, 13 kaj 15 (de la Katedrala Placo) kaj 14, 16 — kaj 31 (de la Placo Cordusio).

Forveturo de Milano-Nord je la 8.20 preter la konata urbo Varese, kies belan lagon kaj monton oni vidos de la vagonaro. Alveno en Laveno-Nord ĉe la Lago Granda (Lago Maggiore) je la 10,28.

De Laveno ŝipe for je la 10,40; alveno en Stresa je tagmezo (12.—). Dum tiu ĉi ŝipa veturado oni pre-

terpasos la famajn Boromeajn insulojn. En Stresa okazos tagmango.

De Stresa je la 14.— forveturo, kaj alveno sur Isola bella je la 14,10. Sur la insulo oni rigardos la faman kastelon kaj, se la tempo tion permesos, ankaŭ la vastan ĝardenon. La insulo estis ĝis la 17a jarcento nuda rifo; de 1650 ĝis 1671 la grafo Vitaliano Borromeo transformis ĝin en paradizon kaj konstruis tie la kastelon. La kastelo enhavas famajn pentraĵojn.

Forveturo ŝipe de Isolabella 16.30, alveno en Laveno 17,50. Komuna mango. Fervoje for de Laveno 19.40, alveno en Milano 21,46.

Kiu — anstataŭ viziti la Isolabella 'n — deziras fari la iom karan ekskurson al la pinto de la montego Mottarone (1491 m. supermare), sekvos la sekvantan itineraĵon. Li devos vespermangi sur la ŝipo dum la veturo al Laveno pro manko de tempo aliloke :

Forveturo de stacio Stresa-Lago	14.25
Alveno Mottarone (per dentrada elektra ferv.).	15.35
Forveturo de Mottarone	16.27
Alveno en Stresa (Stacio Fervoja)	17.35
Forveturo de Stresa ŝipe	18.10
Alveno en Laveno	19.20
Alveno Milano-Nord (lasta vagonaro)	21.46

BIBLIOTECA
SARTORIO GENOVA
ESPERANTO

RIBASSI FERROVIARI

Importante

I ribassi ferroviarii (circa 40-45 %) sono concessi solo per biglietti di andata e ritorno e per il minor percorso su ferrovie dello Stato.

I termini di validità sono : per l'andata a Milano dal 27/8 al 3/9.1913 e per il ritorno dal 31/8 al 6/9.1913.

La richiesta dovrà essere firmata dal possessore. Per il ritorno i biglietti dovranno portare il timbro del Congresso, senza di che non avranno alcun valore.

Ecco le precise riduzioni ferroviarie.

Per ogni chilometro di percorso si pagano :

L. 0,0566 in II cl. ; e L. 0,0370 in III cl. fino a Km. 200

L. 0,0468 in II cl. ; e L. 0,0305 in III cl. da 201 a » 400

L. 0,0318 in II cl. ; e L. 0,0250 in III cl. oltre i 400 Km.

FERVOJAJ RABATOJ

Gravegaj Rimarkoj

La rabatoj [proksimume 40 ĝis 45 pc.] estas aplikeblaj nur al biletoj por iro kaj reveno, nur por la plej rekta vojo sur iutalaj ŝtataj fervojoj kaj nur sur itala teritorio.

Ili valoras por la vojaĝo al Milano de la 27.8. ĝis la 3.9. kaj por la revcjaĝo de Milano de la 31.8. ĝis la 6.9. 1913.

La rajtigiloj (itale « richieste ») kaj la rekonkarto por la rabato devas porti la subskribon de la posedanto. Por la reveturo el Milano la biletoj devas porti la stampon de la kongresa komitato. Sen tiu stampo ili estos senvaloraj. Oni povas stampigi siajn revenbiletojn en la Akceptejo aŭ en la ekspoziciejo de la kongreso.

Kun la rekonkarto ĉiu paginatat aliginto ricevos rajt-

igilon por la rabato. La kongresanoj el Bern devos prezenti la rekonkarton kai la rajtigilon en Iselle, prenante la bileton (ir-revenan) por Milano.

Povos ĝui la rabaton nur tiuj kongresanoj, kies kotizajon la kongresa komitato ricevos ĝis la 22a de aŭgusto 1913.

Listo de la kongresanoj pagintaj la kotizajon antaŭ la presigo de tiu ĉi libreto :

1. Achillini, Demetrio — Genova, Piazza Cernaia 14-6.
2. Arabeno, Michele — Genova, Salita Prione 27-4.
3. Bartolucci, Argeo — Milano, Via XX Settembre 26.
4. Bicknell, Clarence — Bordighera.
5. Bünemann, Elisabeth — Milano, Via Aurelio Saffi 24.
6. Bünemann, Oscar — Milano, Via Aurelio Saffi 24.
7. Cadario, Cesare — Marŝalo de Karab., Torino, Caserma Bergia.
8. Carolfi, Padre Modesto — Fiorenzuola d'Arda (Piacenza).
9. Cattorini, Luciano — Milano, Via Paolo Sarpi 60.
10. Chaussegros, V. — Paris, Place Jussieu 3.
11. Clavenna, Attilio — Sampierdarena, Via Varese 8-5.
12. Clerico, T. Carlo — Villastellone (Torino).
13. Couffinhal, P. — Reims (Francujo) r.de l'Union Fencière 18.
14. De Grada, Giuseppe — Genova, Via Maragliano 17-6.
15. Fasce, Ettore — Genova, Via Cesare Cabella 22-12.
16. Filippetti, Dr. Angelo — Milano, Via Marino 3, III.
17. Forestier, J. — Gex (Ain) Francujo.

18. Genova Esperantista Unuiĝo — Genova, Salita Pollaiuoli 13.
19. Gérard, Fraùlino — Paris, Rue d'Armaillé 9.
20. Ghez, Prof. Dr. Arturo — Trieste, Via Boschetto 13.
21. Graffione, Luigi — Cornigliano, Via Giosuè Carducci 4-3, por la Grupo Esperantista de Cornigliano.
22. Heinz, H. — Frankfurt (Germ.) Bergweg 23.
23. Hemmer, Louise — St. Hubert (Belgujo).
24. Itala Esperanto-Kooperativo — Genova, Salita Pollaiuoli 13.
25. Körner, Frida — Plauen i/V., Fürstenstr. 84. (Germania).
26. Masciotta, Armando — Casacalenda (prov. Campobasso).
27. Masi, Dott. Ubaldo — Bologna, Via Asse 6.
28. Mazzini, Ciro — Genova, Piazza Raibetta 1.
29. Monti, Prof. Pier Carlo — Viggìù (Como).
30. Nanni, Otello — Bologna, Via Mussolini 2. por la Emilia Asocio Esperant.
31. Padulli, Conte Piero — Milano, Via Borgonuovo 26.
32. Padulli, Conte Rinaldo — Milano, Via Borgonuovo 26.
33. Palmeggiani, nob. Avv. Filippo — Bologna, Via Manzoni 1.
34. Partesotti, Arturo — Padova, Piazza Prefettura 6.
35. Pollini, Luigi — Bordighera.
36. Quarone, Giuseppe — Rivarolo Lig., Via Cambiaso 19-11. por la Esperantista Grupo de Riv.
37. Querzola, Ragion. Angeli — Sampierdarena, Via Giord. Bruno 2.
38. Reni, Ameriko — Verona, Via Spolverini 22.
39. Riva, Prof-no Angelina — Sampierdarena, Via Gioberti 12.
40. Roncati, C. — Nice (Franc.), Rue Lépante 23.

41. Saccani, Kapitano Berardo, Genova, Kapitano di Finanza.
42. Sampierdarena Esperanto-Societo — Sampierdarena, V. Varese 8.
43. Schacht, D-ro Petro — Milano, Via Cirillo 22.
44. Spallarossa, Emilio — Genova, Via Alessandro Volta, Ekst. 22.
45. Stromboli, D-ro Alfredo — Genova, Via Cropallo 3.
46. Taliero, Samuele — Milano, Corso Sempione 60.
47. Tancredi, Ing. A Raff. Milano, Via Settembrini 39.
48. Tegoni, Prof-no Elisa — Sampierdarena, Via Gioberti 8.
49. Tellini, D-ro Ahilo — Bologna, Via Vallescura 11.
50. Terzoli, Lino — Milano, Via Felice Casati 17.
51. Vaona, Kav. Adv. Attilio — Verona, Via Leoni 10.
52. Violi, Ragon. Enrico — Milano, Via Al. Tadino 26a.
53. Viterbo, Adv. Carlo Alberto — Firenze, Via de' Cerretani 8.
54. Bianchini prof. sacerdote Giacomo — Udine.

Ali'ultimo momento ce ne pervennero molte altre, che non possiamo qui inserire per mancanza di tempo e di spazio.



La Centralissima

MIGARO — Restoracio en la centro de la urbo, Uta Cappellari ? — **MIGARO**

Servado laù la karto kaj laù fiksita menuo

- Kompleta TAGMANGO, konsistanta el: Viando kun aldonajo, fruktoj, fromaĝo, 0,21 da vino, pano, L. 1,05
sen vino „ 0,95
- Kompleta VESPERMANGO, konsistanta el: Forta supo, viando kun aldonajo, fruktoj, fromaĝo, 0,41 da vino, pano, L. 1,30
sen vino „ 1,10

Por la fiksitaĵ menuoj cititaj, oni por ĉiu teleraĵo havos elekton inter diversaj manĝaĵoj. Por duobla porcio al-dono L. —.50. Makaronioj kun saŭco aŭ « rizoto » (rizo kun tomatoj laŭ itala maniero) L. —.40. Du ovoĵ en butero aŭ frititaj ovoĵ L. —.40; du kuiritaj ovoĵ —.30
Bonaj toskanaj kaj aliaj vinoĵ, en boteloĵ.

Posedanto: *Francioli Vighi*.



La Centralissima

GRANDE PENSIONE SIGNORILE SOLO RISTORANTE, proprietario: *Francioli Vighi*

Cucina casalinga e accuratissima

Nel centro della città, Via Cappellari 7, Milano

Colazione: Piatto carne con guarnizione, frutta, formaggio, vino, pane: L. 1.05
per chi non beve vino „ 0.95
Pranzo: Minestra, piatto carne con guarnizione, frutta, formaggio, vino, pane L. 1.30
per chi non beve vino „ 1.10

L'ora dei pasti è facoltativa; il servizio sempre pronto.

Le colazioni ed i pranzi constano di vari piatti a scelta dei sigg. clienti. Così pure, oltre a quella del giorno, vi sarà altra Minestra al brodo e Pasta al sugo o Risotto a scelta senza aumento di prezzo.

Il bis dei piatti costa cent. 50. La pasta al sugo o il risotto cent. 40. Due uova al burro o in frittata cent. 40, alla « coque » cent. 30 (salvo nel periodo dell'aumento delle uova). Permè cent. 30. Permè pasta o risotto cent. 20.

VINI SCELTI DI BOTTIGLIA

ENHAVO

Bonvena saluto	Paĝoj:	3
Komitatoj honora kaj organiza	»	5
Ĝeneralaĵ informoj	»	6
Akceptejo	»	7
Regularo por la kongreso	»	8
Programo ĝenerala de l'kongreso	»	11
Programo de la kunsidoj	»	13
Gvidilo tra Milano por la komuno vizito	»	14
Programo de la ekskurso al Lago Granda	»	19
Fervojaj rabatoj [gravaj rimarkoj!]	»	21

Indice

Saluto ai samideani italiani	pag.	4
Comitati d'Onore ed Ordinatore	»	5
Norme generali	»	6
Regolamento del congresso	»	9
Programma generale del congresso	»	12
Note storiche sulla città di Milano	»	17
Ribassi ferroviarii (importantissimo!)	»	21
Elenco di congressisti	»	22

